Kion fari ?

Ni uzu dentofadenon el forta silko. Oni fabrikas Y-forman ilon, kiujn oni povas aĉeti en kelkaj landoj (ekz. en Svislando). Oni devas meti la silkon inter la du ekstremaĵoj de ipsilono por uzi ĝin, aŭ oni povas aĉeti la kompletajn ilojn (*Fig. 1.*).




*Fig. 1. Ŝanĝebla fadeno (⇒) por la supraj (maldekstre) kaj la malsupraj dentoj (dekstre).*

Se ni ne povas aĉeti tiujn Y-formajn ilojn, ni tranĉu 30-centimetran silko-fadenon. Se ni purigas la supraj dentojn, ni fiksu la silkon sur la dekstran dikfingron kaj la maldekstran montrofingron; se temas pri la malsupraj dentoj, ni uzu la du montrofingrojn. Ĉi tion ni devas fari, memkompreneble post la normala lavado laŭsisteme dutage aŭ porokaze.

Laŭ Záray la junuloj ne uzu pikilojn, sed la malpli junaj kun atrofiaj gingivoj povas uzi pikilon.

## Literaturo:

[1.] Balogh-Huszár-Sugár: Fog- és szájbetegségek megelőzése (Prevento de malsanoj de la dento kaj buŝo). Medicina, Budapest, 1965. - [2.] Sallai-Gera: Paradontologia (Paradontologio). Medicina, Budapest, 1981. - [3.] Danczinger: A fogpiszkálóról (Pri la dentopikilo). *Magyar Fogorvos*, **1992**, n-ro 4.



# Bestoj en folkloro kaj arto

*Prelego en la Internacia Kongresa Universitato, Antverpeno, 1982, de C. Støp-Bowitz, Universitato de Oslo, Norvegujo*

### Enkonduko

Estas tre probable, ke niaj unuaj prapatroj, kiuj vivis en intima kontakto kun la naturo, tre frue devis observadi siajn ĉirkaŭaĵojn, precipe aliajn vivajn estaĵojn, antaŭ ĉio la bestojn. Kelkaj el tiuj reprezentis danĝerojn, kiujn oni devis evitadi, aliaj fonton de nutraĵo, kiun oni devis malsovaĝigi, hejmigi. Sed estis malfacile imagi, ke informoj pri ĉi tiu frua observado atingu nin.

### Prahistoria tempo

12-jara knabineto estis la unua, kiu ekvidis la plej grandiozan atestaĵon pri la zoologiaj observadoj de niaj plej fruaj prapatroj.

Kelkajn kilometrojn de la urbo Santandero apud la norda bordo de Hispanujo situas la bieno Altamira, en regiono, kie formiĝis multaj kavernoj kaj galerioj en la kalkŝtona grundo. En la jaro 1879 la bienoposedanto, Marcelino de Sautuola, kiu estis ankaŭ amatora arĥeologo, esploris galerisistemon sub sia bieno. Rampante per manoj kaj genuoj li trovis diversajn ŝtonajn ilojn, kiam lia filineto, Maria, kiu lin akompanis, kaj kiu povis rekte stari en la malalta koridoro, subite vokis: *"Paĉjo, rigardu, pentraĵoj pri bovoj !"* Sautuola apenaŭ povis kredi al siaj okuloj, kiam li ekvidis la figurojn de dudeko da bizonoj, du ĉevaloj, lupo, tri aproj kaj tri cervinoj. La ruĝaj, flavaj kaj nigraj koloroj estis freŝaj kiel sur ĵus pentrita bildo, kaj la artisto estis utiliginta la malglataĵojn de la kaverna plafono por doni al la figuroj tridimensian, vivan efikon.

Ĉar bizonoj ne ekzistis en Hispanujo post la glacia periodo, la pentraĵoj devis esti faritaj de prahistoriaj homoj. Tamen komence la erudiciuloj ne volis rekoni ilin. Nur kiam estis trovitaj similaj pentraĵoj en kavernoj en Hispanujo, Francujo, Svisujo, Italujo, kaj pli poste ankaŭ en Afriko, oni havis nedisputeblan pruvon pri ilia prahistoria origino, antaŭ pli-malpli 14 000 jaroj. Vere miriga estas la kono de la artistoj pri siaj objektoj kaj ilia atento pri detaloj.

La plimulto de la kavernopentraĵoj prezentas bildojn pri bestoj. Plej ofte temas pri ĉevaloj, poste sekvas bizonoj kaj bovoj. Cetere oni trovas bildojn pri cervoj, mamutoj, ibeksoj, antilopoj, kaproj, aproj kaj rinoceroj, kaj aldone pri rabobestoj kiel leonoj, hienoj, vulpoj kaj lupoj, malpli ofte pri birdoj, rampuloj, fiŝoj kaj insektoj. Enigmo estas kial la boaco ludis tre modestan rolon en la kavernopentraĵoj, ĉar elfositaj loĝ-lokoj montras, ke ĝi formis gravan nutraĵon por la glaciepokaj homoj.

Kiam la kavernopentraĵoj estis akceptitaj kiel veraj produktoj de glaciepoka arto, oni komencis interpreti ilin. Komence oni konsideris ilin esprimo de ĉasmagio, supernatura rimedo por certigi sufiĉe da ĉasindaj bestoj, kaj ke oni sukcesu kapti sufiĉe da ili. Sed en 1912 tri knaboj, fratoj Begouën, esploris alian grotsistemon apud Ariego ĉe la piedo de la francaj Pireneoj, kie ili, en malgranda halo profunde en la monto, trovis du grandajn bizon-figurojn el argilo. Similajn figurojn oni poste

trovis en aliaj grotoj. Tio ĉi kaj aliaj trovaĵoj naskis ideojn pri la dekoraciitaj grotoj kiel kunvenejoj por religiaj ritoj aŭ similaj celoj.

Ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en norda Ameriko estas trovitaj gravuraĵoj pri la vila rinocero kaj pri elefantoj. En Afriko aperas bildoj pri strutoj, elefantoj, hipopotamoj kaj krokodiloj, pentritaj sur montflankoj. En Skandinavio oni trovas, plejofte sur nekovritaj rokflankoj, gravuraĵojn pri ĉasindaj sovaĝaj bestoj, kiel cervo, alko, boaco kaj urso, kelkfoje ankaŭ balenoj, fokoj, birdoj kaj fiŝoj. Precipe la plej antikvaj estas tre elegantaj. La tiutempaj ĉasistoj deziris akiri povon super la bestoj transprenante ilian identecon, kaj tion oni povis atingi farante laŭeble precizajn bildojn pri bestoj.

En multaj antikvaj ĉasist-kulturoj en diversaj mondopartoj la arto baziĝis sur la sama magia kredo. Ŝajnas ekzemple, ke la arto de la buŝmanoj en Sud-Afriko malpli forte atentis pri la utilo, ol tiu de la ĉasistoj en Eŭropo kaj norda Afriko. Eĉ se ankaŭ la buŝmanoj fidis al la samaj magiaj fortoj, iliaj pentraĵoj havas dekoracian elementon, kiu ŝajnas montri, ke la kreo de la bildo donis al ili ĝojon, sendepende de la bildoj por la rezultato de la ĉaso. Aparte oni rimarkas, ke la bestoj ĉiam estas pentritaj tute naturaj, kontraŭe al la malmultaj homaj figuroj, kiujn oni trovas en kelkaj el la pentraĵoj de la buŝmanoj. La homoj ĉiam estas tre skemigitaj, ĉar vera porteto pri difinita persono donus al la pentristo povon super tiu persono, same kiel desegnaĵo pri elefanto donas al li povon super la elefanto.

## Bestoj en antikvaj civilizacioj

La plej antikvaj civilizacioj, pri kiuj ni havas historian scion, evidente jam posedis mirige ampleksajn konojn pri bestoj. *"Sur la saĝo de hundo sin apogas la mondo"* ni legas en Videvdat (aŭ Vendidad), grava parto de Avesta, la irana sankta libro, kiun la tradicio atribuas al Zaratustro, en la 7a-6a jarcento a. Kr. Ankaŭ en la Biblio estas menciitaj multaj bestoj, kiel hipopotamo, sovaĝa azeno, krokodilo, akrido kaj multaj aliaj.

Bildigo de bestoj estas elstara trajto en antikva egipta arto, rezulto de la totemisma bestokulturado en fruaj egiptaj civilizacioj. Multaj egiptaj dioj estis iaj hibridoj kun homa korpo kaj besta kapo, ekz. Anubis: ŝakalo, Horus: falko, Hathor: bovino. Laŭ egipta opinio la leono estis la reĝo de bestoj, kaj la pastroj praktikis ampleksan sistemon de ritoj, kiuj rilatas al la leono. La leono, aŭ almenaŭ parto de leono, prezentiĝas en sfinkso, kiu kredeble estas la plej fama el ĉiuj egiptaj artaĵoj kun besta motivo. Tiu ĉi impona statuo estas provizita per kapo de faraono kaj korpo de leono. La hieroglifa skribsistemo en la antikva Egiptujo ampleksis riĉan kolekton de bestfiguroj, kaj eĉ multajn moralajn ecojn reprezentis tiaj bestaj figuroj.

En egipta tomba arto la bestoj ne estis reprezentitaj kiel dioj, sed kiel la kunuloj de homoj sur la tero. Entombigante mortintojn oni metis en la tombon ankaŭ posedaĵojn kaj reprezentantojn de la bestoj kaj homoj, kiuj ludis rolon por la mortinto dum li vivis, por ke ili akompanu lin en la vivon post la morto. Plua evoluo de tiu kutimo estis, ke oni komencis poste pentri bildojn el la vivo de la mortinto sur la murojn de la tomba ĉambro. Tiaj tombopentraĵoj, kiuj montras virojn ĉasantajn, fiŝkaptantajn aŭ ludantajn kun katoj, hundoj aŭ malsovaĝaj simioj, atestas pri intereso kaj amo al la bestoj, kiun havis la antikvaj egiptoj. La pentraĵoj, skulptaĵoj kaj reliefoj, kiuj estiĝis en ĉi tiu civilizacio, montras homogenecon, kiu



estas rezulto de tio, ke la artisto estis dependa de severaj reguloj rilate formon kaj stilon. La artaĵojn karakterizas ordo kaj harmonio kiu donas impreson de simpleco, sed tamen la bildoj montras grandan naturismon.

Estas klaraj similecoj inter la egipta civilizacio kaj la alte evoluintaj indianaj civilizacioj en Ameriko antaŭ la tempo de Kolumbo. Ankaŭ la Totek-, Aztek-, kaj Maja-kulturoj en centra kaj suda Ameriko estis bazitaj sur totemisma bestkulto. La pumo aperis kiel sankta besto, kaj bildoj pri agloj, kojotoj, jaguaroj kaj serpentoj prezentas ĉi tiujn bestojn kiel signifoplenajn estaĵojn en la mitologio. Multajn figurojn de plumornamitaj serpentoj kaj dukapaj drakoj, de jaguaroj kaj vespertoj ni trovas en la skulptaĵoj de la Maja-popolo, kiun oni konsideras kiel la plej alte civilizitan centramerikan popolon en la antaŭ-Kolumba tempo. En la pentraĵoj de aliaj tre antikvaj centramerikaj popoloj svarmas homsimilaj estaĵoj provizitaj per partoj de bestoj: elefant-similaj estaĵoj, homoj kun serpenta kapo aŭ kun vosto k.t.p. ; bone konataj estas la flugantaj diabloj de aztekoj, la demono Izpuztek similas grandegan flugsaŭron, kvankam neniu homo iam vidis tian beston, ili formortis milionojn da jaroj antaŭ la apero de la homoj.

En antikva ĉina arto oni trovas abundon da bestoj, kaj naturalismaj kaj mitaj, kiuj funkciis kiel eroj en komplikita sistemo de simboloj.

Greka arto komencis aperi precipe post kiam la egipta pasis sian zeniton. La unuaj ekzemploj de greka best-arto originas de la fiŝkaptista loĝantaro en Mikeno kaj sur Kreto, kiu postlasis ceramikaĵojn dekoraciitajn per bildoj pri maraj bestoj. Ĉi tiuj figuroj, kiuj montras gastropodojn, krustacojn kaj cefalopodojn, stile similas al la egipta arto. Sed iom post iom la grekoj lernis ne nur akcepti, sed ankaŭ demandi; kaj ĉi tiu nova kaj forta deziro pri scio, kiu formis la bazon de scienco kaj filozofio, efikis ankaŭ al la arto. La arto fariĝis esplora, eksperimentanta, kaj la artistoj klopodis detale konatiĝi kun la formoj en la naturo. Ĉi tiuj studoj rezultigis gradon de realismo, kiu donis al la sanktaj bestfiguroj forton kaj dinamikon antaŭe neniam atingitan. Per sia kompreno de la naturo la grekoj enkondukis novan spiritan kvaliton en la best-arton.

La romianoj estis tiom okupitaj pri militaj konkeradoj, administraj problemoj kaj "dolĉa vivo", ke ili malestimis la puran sciencon. Kiam Grekujo venis sub la regadon de Romo, finiĝis la naturscienca esplorado kaj la filozofia spekulativado. La solaj prinaturaj verkoj, kiujn ni posedas el tiu tempo, estas *Pri la naturaj objektoj* de Lukrecio Carus (96 - 54 a. Kr.) kaj la 37-voluma enciklopedio *Naturhistorio* de Plinio maljuna (23 -79 p. Kr.). Precipe la lasta prezentas amason da informoj kunigitaj senkritike kaj senkontrole, tiel, ke gustaj informoj alternas kun la plej absurdaj fabeloj. Kvankam kelkaj natursciencistoj en la pasinta jarcento konsideris la roman aŭtoron erudiciulo, kiu per sia vorto kreis ordon sur ĉiu kampo de scio, ni efektive trovas ĉe Plinio, ofte misprezentitaj, multajn detalojn el al verko de Aristotelo, apud priskriboj de fabelaj monstroj k.t.p., kiujn la greka esploristo estis rifuzinta.

## Ezopo

Kiam oni parolas pri bestoj en la literaturo, multaj homoj antaŭ ĉio pensas pri la fabloj de Ezopo. Ezopo vivis kiel sklavo en Grekujo en la 6a jarcento a. Kr., kaj li estas konsiderata kiel la ĉefa reprezentanto de la fablo, tradicia literatura formo, kiu kredeble estas ankoraŭ multe pli aĝa. En siaj simplaj kaj amuzaj

historietoj pri bestoj Ezopo ne celas priskribi la vivon kaj konduton de la bestoj. La celo de la fabloj estas priskribi la homojn prezentante ilin kiel bestajn figurojn. El la diversaj bestoj en la fabloj ĉiu reprezentas iun homan karakterizaĵon. Ekz. la vulpo reprezentas ruzecon, la ŝafido timemon, la lupo avidecon kaj la leono kuraĝon kaj dignon. Ĉiu fablo unuope estas klopodo, pere de bestaj figuroj, prezenti moralon aŭ utilan instruon rilate homan konduton. Ĝuste ĉi tiu moraliga elemento en la okuloj de la grekoj levis la fablojn de Ezopo alten super la ordinarajn popolfabelojn.

Proverboj estas literature parencaj al fabloj, kaj multaj konataj parolturnoj, kiel ekz. *"lupo en ŝafa felo"*, originas el fabloj de Ezopo. Ke kelkfoje ezopa esprimo aŭ nocio erarvagas, montras jena historio:

Laŭ folkloro, kun origino ĉe Ezopo, la birdoj iam volis elekti sian reĝon; la birdo, kiu kapablas plej alten flugi, estu la reĝo. Plej bonan ŝancon havis la aglo. Nun la eta troglodito, kies ŝanco estis nula, eltrovis ruzaĵon. Ĝi kaŝis sin sur la dorso de aglo, kaj kiam tiu atingis la plej alktan punkton de sia flugo, la troglodito ekflugis de ĝia dorso ankoraŭ etan distancon kaj sekve fariĝis la reĝo de la birdoj. Sed post tio ĝi falis teren kaj rompis al si la voston, tial la vosto de la troglodito ĉiam staras vertikale. Kiam Karlo Linné establis la nomenklaturon de la birdoj, li ne atentis la fablon kaj la folkloran tradicion, donante al alia eta birdo, kiu havas kronosimilan flavan makulon sur la kapo, la nomon Regulus, kio signifas "reĝeto" kaj en Esperanto fariĝis *regolo*. En kelkaj landoj oni retradukis Regulus kiel "birdreĝo" tiel, ke la birdreĝo de la folkloro kaj de la zoologiaj libroj estas malsamaj birdoj. Tia perforto al la folklora tradicio estas tre bedaŭrinda, sed ĝis nun ne estis eble konvinki la zoologojn pri tio.

## La Mezepoko

La kristanoj maltrankviliĝis pri la formo de la greka arto, ili trovis malfacile akcepti la severe realisman arton hereditan. Ili timis, ke tiaj naturalismaj bildigoj povos konduki al idolismo, paganismo. Bildaj prezentoj de bestoj estis konsiderataj aparte danĝeraj, ĉar ili tra la historio estis forte ligitaj al magiaj kredoj kaj ritoj. Ĉi tiu timo rezultigis ŝanĝojn, kaj rilate al la rolo de la bestoj en la arto, kaj rilate al la maniero ilin prezenti. Ili fariĝis ĉiam pli uzataj kiel simboloj aŭ kiel alegoriaj figuroj, kiuj rilatu al difinitaj nocioj aŭ ideoj. Ĉi tiu simbola funkcio ne postulis, ke la bestoj estu naturalisme prezenataj. La best-arto estis survoje for de la realismo kaj en epokon de formalismo kaj skemismo. Tamen ni daŭre trovis mirige realismajn bestfigurojn skulptitajn en preĝejoj kaj sur kapiteloj de monaĥejoj, kaj ili atestas pri la profunda natursento, kiu plu vivis ĉe artistoj kaj metiistoj, dum la skolastikistoj pasigis la tempon diskutante pri vortaj subtilaĵoj kaj pri sensencaj problemoj.

Verko, kiu meritas apartan mencion, estas *Physiologus*, verkita de nekonata aŭtoro en greka lingvo en la 4a jarcento p. Kr. Ĝi prezentas la naturon, precipe la zoologion, kun moraliga tendenco. Kredeble ĝi estiĝis por subteni la instruadon en religiaj socioj kaj, per citaĵoj pri bestoj el la Biblio, peri la natursciencajn ideojn el la verkoj de Aristotelo. Per la sennombraj tradukoj kaj reverkigoj, kiujn la verko spertis tra la jarcentoj, kreskis la ĥaoso de fantaziaj detaloj kaj intermikso de bestnomoj trans ĉiujn limojn. Post kiam ĝi estis konata dum pli ol 1000 jaroj, *Physiologus* fine malaperas en la 15a jarcento, sed multaj detaloj el ĝia enhavo herediĝis inter monaĥoj kaj teologoj, pensuloj kaj erudiciuloj. Inter ili estu menciata Albertus Magnus (1206-1280), kiu enkondukas la kristanan rekonon de la pensoj de



Aristotelo, kaj estu unu el la unuaj por forĵeti multajn malnovajn ideojn, ekz. tiun pri la ansero, kiu estiĝas kiel frukto sur arboj laŭ riveroj ! Cetere la scioj de Aristotelo travivis la Mezepokon inter la araboj, sufiĉas mencii nomojn kiel tiujn de la kuracisto kaj filozofo Avicenna (Ibn-Sina, 980-1037) kaj de Averroës (Ibn-Roŝd, 1126-1198) en Kordobo.

## Monstroj kaj superstiĉoj

Dum la lasta parto de la Mezepoko aperis nova interesiĝo pri la antikva tempo, la renesanco. Eĉ se la homo estis en la centro de la atento, la deziro pri sciencaj progresoj rezultigis, ke ankaŭ la bestojn oni pli detale studis. Ĉi tiu scienca sinteno estas karakteriza por la arto dum la renesanco, Leonardo da Vinci, Dürer, k. a. kreis grandiozajn desegnaĵojn pri bestoj, bazitajn sur detalaj observadoj. Samtempe la pli vigla vojaĝado flanke de komercistoj, esploristoj kaj aventuristoj portis al Eŭropo priskribojn, ofte miskomprenitajn aŭ fantaziajn, de ekzotikaj bestoj (kelkfoje ankaŭ ekzemplerojn da tiaj bestoj). Tio ĉi, kombine kun amo al mistiko kaj kun fantaziaĵoj transdonitaj per Plinio kaj *Physiologus*, rezultigis aperon de amaso da raportoj pri plej fantaziaj monstroj, pri kiuj oni povas legi en la raportoj de Marco Polo kaj aliaj vojaĝantoj, kaj kiujn la homoj senkritike akceptis.

En la daŭro de relative malmultaj jaroj aperis pluraj verkoj, parte de la enciklopedia tipo, parte monografioj pri difinitaj grupoj de organismoj. Ni menciu ĉi tie la librojn de Konrad Gessner (1515-1565), de Ulisse Adrovandi (1522-1607) kaj de la sveda ekleziulo Olaus Magnus (1490-1557). En tiaj verkoj oni trovas ofte relative precizajn priskribojn de la tiam konataj bestoj, sed multfoje la aŭtoroj akceptis ankaŭ organismojn kaj fenomenojn eltrovitajn de la popola fantazio.

Multaj el la monstroj kaj fantaziaĵoj fontas el la antikva tempo, kaj en pluraj okazas oni povas trovi klarigon pri ilia estiĝo. Ni rigardu kelkajn ekzemplojn.

Drakoj aperas jam en tekstoj el Babilono, en la Apokalipso en la Biblio, sed troviĝas ankaŭ en Orienta Azio, kaj sur standardoj, blazonoj k.t.p. Ofte la drakoj simbolas malbonon, kaj herooj, kiel ekz. Sankta Georgo, luktis kun drako kaj venkis ĝin. En Ĉinujo tamen la drako simbolas la bonon, ĝi havigis vivigan pluvon. Ordinare la drako havis serpentan korpon, vespertajn flugilojn, grandajn ungegojn kaj teruran faukon, el kiu ŝprucis fajro. Al Skandinavio la drako venis nur en la Mezepoko kaj tie fariĝis ŝatata motivo en ornamenta arto, precipe konata de norvegaj fostopreĝejoj kaj vikingaj ŝipoj.

Unukornulo estas mita besto plej ofte prezentita kiel blanka ĉevalo kun unu rekta, spiral-tordita korno sur la frunto. Ĝi aperas kiel dekoracio jam en la antikva tempo, sed ludis pli grandan rolon en la Mezepoko, kiam ĝi simbolis virgecon. Oni ankaŭ kredis, ke la korno ŝanĝas sian koloron, se estas veneno en la proksimeco, sekve estis grave meti kornopecon sur la tablon por malkovri ĉu la manĝaĵo estas venenigita. Plej ofte dentego de narvalo (cetaco, kiu havas unu rektan, spiral-torditan dentegon) estis akceptata kiel vera korno de unukornulo. En la heraldiko ĝi aperas ekz. en la blazono de Britujo. Ĝin inspiris kredeble la hinda unukorna rinocero aŭ oriks-antilopo vidita deflanke tiel, ke oni vidas unu kornon.

Fenikso estas mita birdo unuafoje priskribita de Herodoto (484-425 a.Kr.). Ĉiun 500an jaron ĝi venis el la Oriento, bruligis sin mem, kaj el la cindro aperis nova fenikso kun karakterizaj ruĝaj kaj oraj plumoj. Ĝi forportis la restantan cindron pakitan en mirho kaj folioj. Montriĝas, ke indiĝenoj de Nov-Gvineo de

antikvaj tempoj negocadas per plumaroj de paradiz-birdoj, kiujn ili ekspedas al Azio kaj Mediteraneaj landoj. Oni protektas la plumarojn per mirho en ovoformaj pakaĵoj el bananfolioj. Jen kredeble la origino de la mito.

Grifo estas legenda estaĵo kun aglaj kapo kaj flugiloj kaj leona korpo. Ĝi estis konsiderata malica, kruela, kaj ofte gardis trezorojn. Ĝi troviĝas en antikvaj pentraĵoj kaj poste eniris en la heraldikon. La origino estas nekonata; provo rilatigi ĝin al ekzistanta birdo ne sukcesas.

Sirenoj estis estaĵoj kun birda korpo kaj kapo de bela virino. Laŭ Homero ili loĝis sur insuloj, kaj per sia bela kantado ili logis maristojn en pereon. Odiseo, kiu estis avertita, sukcesis eviti ilin, ŝtopante al siaj maristoj la orelojn per vakso, dum li lasis sin mem ligi al la masto. La vorto hodiaŭ estas la scienca nomo de ordo de maraj mamuloj, kiu ampleksas dugongojn kaj manatojn, al kiuj mi tuj revenos. Harpioj estis similaj monstroj, demonoj de la ventego, kiuj rabis homojn aŭ ŝtelis de ili la manĝaĵojn.

Ankaŭ marvirinoj estis duone homoj, duone bestoj. Ĉe la ĉinoj la marvirinoj ne havis voston, ili estis belaj, helhaŭtaj estaĵoj, kiuj pasigis la tempon teksante kaj plorante perlojn. En la okcidento la marvirinoj havis fiŝan voston anstataŭ kruroj, kaj per bela kantado ili logis al si maristojn kaj fiŝkaptistojn. Plej verŝajne la sirenoj, t.e. la dugongoj kaj manatoj kontribuis al la legendo. La inoj de tiuj bestoj havas la laktoglandojn sur la brusto, kaj donante lakton ili tenas la idon simile kiel faras virino. Kolumbo, revenante de Kariba Maro, raportas, ke li observis marvirinojn, kiuj sendube estis inoj de manatoj, kiuj nutris siajn idojn. Ekzistas ankaŭ legendoj pri marviroj, kiuj logis al si virinojn.

Troviĝas historioj ankaŭ pri aliaj fabelaj estaĵoj, kiujn mi ne povas priparoli ĉi tie, ekz. kentaŭroj, ĥimeroj, k.t.p.

Kelkfoje, kiam homoj observis nekompreneblan fenomenon, ili elpensis klarigon. Malgranduloj-ronĝuloj kiel musoj kaj lemoj en kelkaj jaroj aperas amase. Olaus Magnus klarigis, ke tiuj bestoj, kaj ankaŭ ranoj, fiŝetoj, vermoj, estiĝas en la nuboj kaj "pluvas" sur la teron. Tute senbaza tia ideo tamen ne estas. Kelkaj lumbrikedoj en mildaj, pluvaj aŭtunoj iras en vintrodormon fiksitaj al folioj. Kiam vento en mildaj, pluvaj tagoj dum la vintro levas la foliojn, la vermoj falas de la flugantaj folioj sur la neĝon en Skandinavio.

Lepadoj estas strangaj krustacoj kovrataj de kiraso el kalkaj plataĵoj kaj fiksitaj per dika tigo al lignopecoj flosantaj sur la maro.Se oni malfermas la kirason, la besta korpo, kun iom da fantazio, similas al birdido. La kolringa ansero aŭ barnaklo nestas sur izolitaj oceanaj insuloj. La mezepokaj homoj observis, ke ĉiujare ĝi venas al bordo kun siaj idoj, sed oni neniam vidis la nestojn. Evidente la birdidoj en la lepadoj estas idoj de anseroj. Sekve, oni konkludis, la anseroj estiĝas el la ŝaŭmo de la maro, kaj ne estas birdoj, sed fiŝoj ! Konsekvence la islandaj monaĥoj kun bona apetito manĝis anseran rostaĵon dum la fasta tempo.

En kelkaj okazoj montriĝis, ke la fablobestoj efektive ekzistas. Dum la pasinta jarcento estis en Okcidenta Afriko onidiroj pri kurioza besto nomata okapio. La historio ricevis sian konfirmon, kiam angla esploristo Sir Harry Johnston ĉirkaŭ 1900 sendis haŭton de okapio al Anglujo. Simile rakontoj pri sovaĝaj viroj en okcidenta Afriko kondukis al la malkovro de la gorilo. En la 1960aj jaroj raportoj pri pumo vaganta en suda Anglujo kaŭzis multe da teruro kaj timo, ĝis fine montriĝis, ke temas pri sovaĝiĝintaj grandaj kato kaj hundo.



Ofte la homoj emas vidi mistikajn monstrojn en la deformitaj korpoj de maraj bestoj subordiĝintaj. Antaŭ 400 jaroj aperis raportoj pri "maraj monaĥoj" trovitaj ĉe skandinaviaj bordoj. Desegnaĵoj montris monaĥan estaĵon kun skvama korpo, pastra vesto kaj naĝilsimilaj brakoj. Plej verŝajne temis pri subordiĝinta giganta cefalopodo, Arĥiteŭto.

Kelkaj monstroj, kies ekzisto neniam estas pruvita, daŭre vivas en la homa fantazio. La aŭstralia bunjipo, granda estaĵo vivanta en marĉoj, verŝajne reprezentas intermiksiĝon de mankhavaj observoj, kaj estas malfacile diri, kio povas esti la bazo de la legendo. Eĉ la jetio aŭ "terura neĝviro" en Himalajo baziĝas nur sur lokaj legendoj kaj fotografaĵoj montrantaj piedsignojn en neĝo. Laŭdira skalpo de jetio montriĝis esti farita el haŭto de serovo, ĉamosimila himalaja besto, kaj ekspedicioj senditaj por serĉi ĝin, trovis nenion. Kompreneble povas ekzisti nekonataj bestoj en malfacile alireblaj montaraj regionoj, sed ĝis pruvo estos trovita, oni restu skeptika.

Raportoj pri marserpentegoj aŭ monstroj en lagoj ĉiam estas bonvenaj sensacioj. Ili ĉiam baziĝas sur laŭdiraj observoj, fantaziaj desegnaĵoj kaj malklaraj fotografaĵoj, sed neniam oni sukcesi trovi ekzempleron aŭ eĉ nur oston aŭ alian parton de la korpo. Ĝis tiaj observoj estos konfirmitaj per trovita specimeno aŭ per fotografaĵo, kiu montras precizajn detalojn, oni devas dubi pri la ekzisto. Plej ofte la "serpentego" montras vicon da ĝiboj sur la akvosurfaco. Povas temi pri aro da malgrandaj cetacoj, ekz. delfenoj, aŭ aliaj bestoj, kiuj kutime naĝas vice. En aliaj okazoj oni sendube observis tentaklon de arĥiteŭto, kiu povas atingi longon de 14 m kaj esti dika kiel homa brako. La konata monstro en la lago Loch Ness en Skotlando baziĝas sur miloj da observoj faritaj de homoj sen necesa instruiteco kaj sur malklaraj fotografaĵoj, kiuj efektive montras lutrojn, ondojn, birdojn aŭ aliajn aĵojn. Plej verŝajne la origino de *Nessie* estas aro da lutroj vice naĝantaj. Aliaj tiaj lagaj monstroj montriĝis fonti el amasiĝintaj lignopecetoj kaj folioj kuŝintaj sur la fundo putrante kaj fermentante, kaj kiuj leviĝis al la surfaco per gasoj produktiĝintaj.

## En la nuntempo

En la franca literaturo elstaras Jean de La Fontaine (1621-1695) kun siaj historioj pri bestoj. Uzante fablotradicion kaj Ezopon kiel fontojn li kreis dramojn rafinitajn kaj komikajn. Ankaŭ en nia jarcento aŭtoroj utiligis bestojn por kritikaj aŭ satiraj prezentoj de la homa socio. Konataj estas ekz. *La salamandra milito* de Karel Ĉapek (1890-1938), *Insekta vivo* de Karel kaj Joseph Ĉapek (1887-1945). George Orwell (1903-1950) en *La besto-farmo* (1945) faris satiron pri la diktaturo.

En la bildoarto de nia tempo la bestoj ne havas specialan kulturan funkcion. Sed la bestoj kaj besta vivo daŭre ludas rolon kiel ĉefmotivo aŭ kiel elemento, eĉ se la celo povas multe varii de unu artisto al la alia. Same kiel en la literaturo, ankaŭ kelkaj bildartistoj utiligas la bestojn kiel motivon por prezenti ecojn de homoj. Kiel ekzemplon mi menciu nur la libron *Ĉu la bestoj havas animon ?* de la norvega natur-lirikisto Theodor Kittelsen (1857-1914).

La plej novan utiligon de bestaj figuroj ni vidas en la desegnofilmoj kaj la desegnitaj bildoserioj. Sur ĉi tiu kampo Walt Disney (1901-1966) kreis konatajn figurojn kiel *Mickey Mouse*, *Donald Duck* kaj aliajn, per kiuj li ekspozicias diversajn homajn ecojn, ofte precipe la malpli laŭdindajn flankojn de la homoj.

Ne estas eble en mallonge prelego priparoli ĉiujn flankojn de tia vasta temo. Sekve mi klopodis doni nur superrigardon.